

ESPERANTOLOGIA FORUMO 2000:  
TEKSTOJ

redaktis

Fabrizio Pagliaroli

Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 13

COEDES - Milano

2000

## ENHAV-TABELO

Enkonduko de Renato Corsetti	p. v
Fabrizio A. Pennacchietti <i>Kristanaj kaj judaj versioj de islama legendo</i>	.. p. 1
Matteo Santipolo <i>Realtà sociolinguistiche a confronto: Italia e Inghilterra...</i>	.... p. 15
Fabrizio Pagliaroli <i>Esperantigo de propraj nomoj: teorio kaj praktika uzado</i>	.. p. 29
Anna Löwenstein <i>Kial mi favoras -ujo</i>	p. 38

Renato Corsetti  
(Universitato de Romo "La Sapienza")

## ENKONDUKO

La "Grupo pri Interlingvistiko kaj Esperantologio" de Itala Esperanto-Federacio daŭre aktivis tra la pasinta jardeko. Ĝi aranĝis, kaj pluaranĝas, interlingvistikajn forumojn okaze de la naciaj Esperanto-kongresoj kaj ĝi prizorgis plurajn eldonaĵojn ĝis ĉi tiu 13-a kajero de "Materiali di interlingvistika ed esperantologia". El ĉiuj eblaj organizaj modeloj, de la germana ĝis la usona, italaj interlingvistoj kaj esperantologiistoj elektis ĉi tiun senambician modelon, kiu havas la avantaĝon klare montri tion, kio ili estas, kaj klare serĉi konsentojn kaj kunlaborojn en la scienca mondo, ne kaŝante la bazan esperantistecon de la prizorgantoj de la grupo.

Iliaj interesoj estas plurflankaj, kiel aparte montras ĉi tiu kajero.

La artikolo de F. Penakjeti (Pennacchietti) estas parto de tiu intereso pri la orienta mondo, kiu ĉiam estis vivanta inter italaj esperantistoj. Sufiĉas memori pri A. Bausani. Estis vera plezuro por mi malkovri la poetajn talentojn de tiel serioza studanto, kia F. Penakjeti estas por esperantistoj kaj por neesperantistoj.

La kontribuo de M. Santipolo malkaŝas alian dazŭran intereson de italaj interlingvistoj pri la socia dimensio de lingvoj. Kiu konas nin, ne surpriziĝos, kaj junaj esploristoj pri sociolingvistiko, kiel M. Santipolo, certe havos brilan estontecon inter ni.

Fine la du artikoloj de F. Paljaroli (Pagliaroli) kaj A. Levenŝtajn (Löwenstein) reportas nin al unu el la daŭraj temoj de ĉi tiuj interlingvistikaj forumoj: la fideleco al la klasika Esperanto kaj la provo defendi ĝin kontraŭ naturismaj flosadoj, kiuj evidentiĝas eĉ en la grandaj vortaroj.

Estas klare ke el ĉiuj planlingvoj nur Esperanto sukcesis iĝi lingvo, danke al la genia intuicio de tiuj, kiuj diris "Ni ne plu parolu pri reformoj, nun. Ni fosu nian sulkon!" Kiam

Esperanto estos disvastigita tra la tuta mondo kaj havos grandan parolantaron, tiam oni provu ŝanĝi ion, se io estas ŝanĝinda.

Italaj interlingvistoj, kiuj ankoraŭ ne perdis la fidon je tio, ke iam racio triumfos kaj la internacia komunikado okazos sur "neŭtrala lingva fundamento", restas ĝis hodiaŭ fidelaj je tiu starpunkto.

*Fabrizio A. Pennacchietti*  
(Universitato de Torino)

## **KRISTANAJ KAJ JUDAJ VERSIOJ DE ISLAMA LEGENDO**

Ĉo dar rah bebini boriĝde sar i / ④  
ke gĥaltân ravad suj e mejdân e mâ  
az u pors az u pors asrâr e mâ  
k az u besnavi serr e penhân e mâ

„Se vi tranĉitan kapon ekvidos sur la strato  
venanta ruliĝante sur Nian ebenajon,  
kuraĝu, ĝin demandu pri Niaj praarkanoj,  
por ke ĝi vin informu pri kaŝa Nia sekreto”

Ĝalal ad-Din Rumi (1207-1273)

### 1. Enkonduko

En jaro 2000, kiam la Universala Kongreso de UEA gatis en lando juda, nome Israelo, kaj kiam ties antaŭkongreso okazis en lando islama, nome Jordanio, mi opinias ke estas inde por Itala Kongreso de Esperanto dediĉi spacon al temo kiu koncernas kaj judojn kaj islamanojn kaj kristanojn. Casalecchio di Reno, kiu ĉi-jare nin gastigas, estas ja la pordo de Bolonjo. Nu, la bolonja universitato estas la sola universitato en Italio kiu posedas samtempe kaj tute novan instituton pri islama kulturo kaj ĵus fonditan esplorcentron pri mezepoka juda kulturo. Bolonjo kaj Casalecchio di Reno kaj nia kongresejo povas do esti prave rigardataj kiel ĝustaj lokoj por paroli ĉi-jare pri interkultura temo rilata al la tri monoteismaj religioj.

## 2. La legendo nomata *Jesuo kaj la kranio* en la islama mondo

Ekzistas legenda persono kies pretenditan 'tombon' eŭropaj vojaĝantoj trovis en tri diversaj, inter si tre malproksimaj lokoj: en Darbent, Dagestano (Adam Olearius, 17a jc); apud Hilla, Irako (Pietro della Valle, 17a jc); kaj en Nédroma, Alĝerio (Louis Massignon, 20a jc). Temas pri unu el la du protagonistoj de islama eskatologia legendo, nome de legendo kiu okupiĝas pri la transmondo laŭ la islama doktrino. Ĝia titolo estas *Jesuo kaj la kranio*.

Sur tiu ĉi paĝo pendas epigrafe versokvaro kiun verkis la granda persa mistika poeto Ĝalal ad-Din Rumi, vivinta en Turkio en la 13a jarcento p.K. Ĝi atestas per la aŭtoritato de ĝia aŭtoro la reputacion kaj la disvastiĝon je kiuj la ĵus menciita legendo ĝuis en la mezepoka islama mondo. Frapita de ĝia nekutima karaktero la granda islamisto kaj esperantisto Alessandro Bausani ĝin difinis „aparta kristan-islama legendo”.

La unua mencio de *Jesuo kaj la kranio* retroiras al la centrazia erudiciulo Ishaq bin Bišr (m. 821, Buĝiaro), kiu ĝin atribuis al la jemena tradiciisto Ka‘b al Ahbar (7a jc). Pri la legendo parolis en la 11a kaj 12a jarcentoj arabaj literaturistoj kaj eminentuloj de la du ekstremoj de la islama mondo, nome Irano unuflanke (Abu Nu‘ajm al-Isfahani kaj Abu Hamid al-Gazzali), kaj Andaluzio aliflanke (Abu Bakr at-Tartuŝi).

Jesuo, laŭ tiu legendo, trafis iam en dezerto grandan homan kranion. Ĝin paroliginte, li demandis ĝian posedinton pri lia surtera vivo. La kranio sin prezentis kiel paganan reĝon kies animo tiam baraktis en infero. Ricevinte detalajn kaj informojriĉajn respondojn pri lia surtera vivo, pri liaj iamaj potenco, riĉeco kaj pompo, Jesuo demandis plue pri la cirkonstancoj de lia morto kaj pri la stato de lia animo tuj post la morto en la tombo. Fine li petis lin priskribi la suferojn kaj turmentojn de infero. Tiom impresaj estis tiuj priskriboj ke Jesuo kortuŝiĝis pri la sorto de la damnito. Tial li petis Dion redoni korpon kaj vivon al la kranio. Dankinte, la revivigito elpasis siajn pekojn fariĝinte ermito sur monto.

Temas do pri miraklo atribuita al Jesuo Kristo, kiun tamen neniu ekster-islama tradicio konas.

La legendo disvastiĝis ĝis preskaŭ la kvar anguloj de la islama mondo, ĝis kie alvenis la entuziasmaj diskonigantoj de islamo, nome la popolrakontistoj kaj la pli-malpli oficialaj predikistoj de la nova religio. Sed precipe ĉe la mistikaj rondoj tiu legendo ĝuis apartan favoron, kaj sekve de tio ĝi estis tradukita en la diversajn lingvojn de islamo.

Decidan rolon en la disvastigo de la legendo *Jesuo kaj la kranio* ludis la fama persa mistika poeto Farid ad-Din Attar (ĉ. 1119 – ĉ. 1220 p.K.), naskita kaj vivinta en Niŝapuro en orienta Irano. Unue li aludis la epizodon

de la damnito revivigita de Jesuo en sia verko *Elahi-name* „La Dia Libro”. Multaj specialistoj pri persa literaturo opinias ke li poste verkis ĉi-teme poemon titolitan *Gomgome-name* aŭ *Hekajat-e Gomgome* „La libro aŭ rakonto de la kranio”.

Tiun verkon oni tradukis kaj diversmaniere adaptis en anatolian turkan, ĉagatajan, kazakan, kurdan, urduan kaj paŝtuan, eĉ en la malajan, javan, sundanan kaj aĉean, kvar lingvojn de la islama Ekstrema Oriento. Apartan originon havas male la araba versio de la sama legendo, versigita en nordokcident-afrika araba dialekto.

La disvastiĝo de la legendo *Jesuo kaj la kranio* vekis certan devotecon por la reĝo fariĝinta ermito. Tial pluraj lokoj, kiel ni jam supre diris, fieris kaj fieras esti la pretendita sidejo de lia respektata tombo.

### 3. La legendo *Jesuo kaj la kranio* ekster islamo

La legendo *Jesuo kaj la kranio* fariĝis populara eĉ ĉe ne-islamanoj, nome ĉe kristanoj kaj ĉe judoj vivantaj en islamaj landoj. Memkompreneble la ne-islamaj versioj elstrekis el ĝi la plej evidentajn referencojn al la islama doktrino pri transmondo.

La kristanaj versioj estas verkitaj aŭ en la aramea siria lingvo aŭ en nov-aramaj dialektoj aŭ en la araba lingvo. Unu, tute aparta, estas verkita en la kartvela lingvo. Ĉiuj el ili, krom la kartvela, ĉefe pro la malklera karaktero kiun ili havas kaj pro tio ke ili ne estis submetataj al eklezia kontrolo, tute naive atribuas al Jesuo miraklan eventon pri kiu neniu apokrifika teksto rakontas. Tiurilate ili rekte dependas de la islama modelo de la legendo. Fakte, laŭ la islama doktrino, nur elstara profeto kiel Jesuo, rigardata kiel nesuperebla modelo de miraklofaranto, foje nomita eĉ *Ruh Allah* „Spirito de Dio”, havas la rajton kaj la povon revivigi mortinton. Cetere, la kristanaj versioj estas sufiĉe sendependaj de la islama modelo.

Pri kio koncernas, nun, la judajn versiojn de *Jesuo kaj la kranio*, memevidente ili ne asignis al Jesuo Kristo la rolon kiun li ludas en la islamaj kaj en la kristanaj versioj. Jesuo estas tute simple forstrekita kaj anstataŭigita per alia persono.

#### 3.1. La identeco de la kranio

Laŭ la orienta arab-islama tradicio la antikva idoladoranta reĝo, de kiu restis nur kranio, ne ricevis propran nomon. Pri li oni nur rakontas ke iam li estis reĝo „de Sirio kaj Egiptujo”, kaj verŝajne tiu estas maniero por aludi Palestinon. Male laŭ la jemena tradicio kiu konserviĝis en okcidenta



Nord-Afriko kaj Hispanio kaj kiun raportas la hispan-araba klerulo Abu Bakr at-Tartuŝi, la viro revivigita de Jesuo estis jemena reĝo nomita Balwan bin Hafis. La araba nordokcident-afrika versio supre menciita aldonas la nomon de lia avo: Balwan bin Hafis bin Daylam.

Aliloke, en la ne-araba islama mondo, komence de la persa poemo atribuita al Farid ad-Din Attar, tiu antikva reĝo estas nomata Ĝomĝome' aŭ Ĝomĝom', propra nomo kiu respondas fakte al la araba substantivo *ĝumĝuma* „kranio”. La tiel nomata persono ricevas krome la kvalifikon *sultan* „sultano”, kiu rajte apartenas al li. Laŭlitere *Ĝomĝome Sultan* povus signifi „sultanon kranion”. Pri li sammaniere oni diras ke li estis reĝo de „Sirio kaj Egiptujo”.

Karakterizaĵo de la kristanaj versioj de nia legendo estas pliĝustadire la identigo de la revivigita reĝo kun ia „abato Arsenio reĝo de Egiptujo”, persono ne pli klare specifita. Povus temi pri folkloro memoro pri Sankta Arsenio la Granda (ĉ. 353 – ĉ. 450 p.K.), anakoreto en la egipta dezerto kaj eklezia patro. La „Maksimoj de la Patroj en la dezerto” rakontas ke li estis „patro de reĝoj”. Fakte li estis la gubernisto kaj la baptopatro de la estontaj romiaj imperiestroj Arkadio kaj Honorio. La ĵus menciita verko rakontas ke, antaŭ ol li monakiĝis en Egiptujo, li disponis en Konstantinopolo, ĉe la kortego de la imperiestro Teodozio 1a, pri mil servistoj vestitaj per „silko, juveloj kaj oraj zonoj”. Je liaj piedoj sternaĝis multekostaj tapiŝoj. Ĉiuj tiaj detaloj kaj aliaj ankoraŭ reaperas ankaŭ en la plej etentitaj islamaj versioj de la legendo.

Verŝajne la kristanaj versioj en siri-arama, nov-arama kaj araba lingvoj gardas memoron de kristana prateksto aperinta antaŭ la ekesto de islamo. La historio de Sankta Arsenio – kiu forlasis la luksaĵojn de la konstantinopola kortego por elpigi siajn pekojn en la dezerto – probable kombiniĝis kun kelkaj aliaj hagiografiaj kaj eskatologiaj elementoj por fine konsistigi legendon transprenotan de popola islama tradicio.

En la orienta kristana literaturo ne mankas certe prisanktulaj rakontoj kiuj raportas dialogon pri transmondo inter sankta ermito kaj damnita mortinto. Oni rakontas, ekzemple, ke la egipta asketo Sankta Makario la Granda (ĉ. 300 – ĉ. 390 p.K.) interparolis kun kranio de pagana pastro, kaj ke Sankta Pizenco, episkopo de Koptos en Egiptujo (ĉ. 586 – ĉ. 640 p.K.), pridemandis pri transmondo mumion de faraono. Ankaŭ Sankta Makario el Antiokio kaj Sankta Georgo ekhavis informon pri infero: la unua reviviginte kaj baptinte kadavron akompanatan tombejen, la alia reviviginte kaj baptinte idoladorinton, de kiu restis nur kelkaj ostoj.

La rakonto pri unu el tiuj eksterordinaraj renkontiĝoj inter damnito kaj miraklofaranta sanktulo verŝajne pliriĉiĝis en la tempodaŭro per du novaj elementoj: unuflanke per priskribo de la transmondo eltirita de apokrifaj tekstoj kiel la *Apokalipso de Petro* (2a jc p.K.) kaj la *Apokalipso*



de Paŭlo (3a jc); aliflanke per la persona historio de Sankta Arsenio. Kiam finfine tiu rakonto eniris en la repertuaron de la popolaj islamaj legendoj, la islamaj rakontistoj kaj popolpredikantoj identigis la sanktulon kiu revivigis la idolanan reĝon kun Jesuo mem.

### 3.2. Anstataŭantoj de Jesuo

#### 3.2.1. Judaj versioj de la legendo *Jesuo kaj la kranio*

Ni konas nur du judajn versiojn de *Jesuo kaj la kranio* kaj ambaŭ kompreneble anstataŭigas Jesuon per alia persono.

La unua estas proza versio entenata en la komentario pri la juda verko *Pirge Abot* „Maksimoj de la Patroj”, kiun verkis arablingve David ben Joŝua Majmuni (Egiptujo, 14a-15a jc p.K.). Ĝi fidele spegulas la arab-islamano modelon, kiun male la iranano Farid ad-Din Attar draste resumis. La jud-araba versio fakte prezentas detalan priskribon pri la strukturo de infero laŭ sep cirkloj. Al ĉiu cirklo respondas aparta tipo de pekuloj al ĝi destinitaj. La rolo de Jesuo transprenas sennoma vojaĝanto.

Tipe juda aldoniĝo en tiu ĉi teksto estas ke la animoj de la damnitaj vojaĝas ĝis la paradizaj pordoj, kie sur du tronoj sidas Abrahamo kaj Moseo. De tie la animoj estas pelataj kaj ĵetataj en inferon. Krome la sennoma vojaĝanto kaj spektanto ne havas la povon revivigi la mortintojn kaj ilin savi. Tial la damnito rajtas nur averti la vojaĝanton pri la fatalaj sekvoj de pekado.

La dua juda versio estas male versigita kaj estas fidela jud-persa reproduktaĵo de la islama poemo de Farid ad-Din Attar. Ĉi-kaze, anstataŭ Jesuo aperas Moseo kaj anstataŭ tipe islamaj, eĉ ŝiismaj, esprimoj, aperas judaj esprimoj.

#### 3.2.2. La kartvela versio de *Jesuo kaj la kranio*

La plej aparta el la ne-islamaj versioj de la legendo *Jesuo kaj la kranio* estas sendube la kartvela. Ĝi estas poemo el 31 strofoj. Ĝin publikigis en 1892 en Tbiliso D. Giviŝvili kaj D. Lazarevi kune kun rusa traduko. Tie ĉi, anstataŭ Jesuo, aperas iu Sankta Gregoro, kiu povus esti Sankta Gregoro la Prilumanto, la sanktulo kiu kristanigis Armenion en jaro 314.

Malgraŭ la tributo pagita por konformiĝi al la kristana religia sentemo, la kartvela poemo estas ankoraŭ sufiĉe fidela al la strukturo de la persa poemo atribuita al Farid ad-Din Attar.

La kranio sur kiun stumblas Sankta Gregoro prezentigas kiel reĝo Ĝumĝum Mitaroz, persona nomo kiu malkaŝas la persan originon de la rakonto, probable pere de kurda traduko. Sankta Gregoro ne perdas la okazon fari longan predikon kaj severan riproĉon al la damnito, sed fine li pardonas lin kaj forviŝas liajn pekojn.

#### 4. Konkludo

La legendo nomata *Jesuo kaj la kranio* estas produkto de kultura osmozo kaj de religia interagado je popola, malklera nivelo en la daŭro de pluraj jarcentoj. Probable la legendo havas kristanan originon, sed ĝi disvastiĝis nur sur la islama teritorio, ekde Jemeno ĝis Andaluzio kaj ekde Centra Azio ĝis Hindujo kaj Indonezio.

Amata precipe de sufiuj kunfratularoj, kiuj ĝin tradukis en la plej diversajn lingvojn de la islama mondo, ofte ĝin versigante, la legendo estis adoptita eĉ de kristanoj kaj de judoj vivantaj en la samaj mondpartoj. Ili ĝin adaptis al sia kulturo kaj al sia religia sentemo.

En ĉiuj kristanaj versioj, krom unu, nome la kartvela, restas spuro de probabla antaŭislama prateksto. La kranio, al kiu Jesuo redonis vivan korpon, aperas kiel la kranio de iu „Abato Arsenio, reĝo de Egiptujo”, fikcia persono probable respondanta al historia persono, t.e. Sankta Arsenio la Granda. Oni ricevas la impreson ke la proksimorientaj kristanoj gardas pere de *Jesuo kaj la kranio* la memoron de unu el siaj legendoj. Tiu, tra la jarcentoj, alprenis la saman enhavon kaj la saman formon de simila legendo rakontata de iliaj islamaj najbaroj.

#### 5. Teksto de „La rakonto de Sultano Ĝomĝom’ „ verkita de Farid ad-Din Attar kaj elpersigita de Fabrizio A. Pennacchietti

- 1) Pro la decid’ arbitra de l’ alta Potenculo,  
kreinto kaj reganto de l’ ter’ kaj de l’ ĉielo,
- 2) Jesuo pasis fojon laŭ bordo de rivero  
kaj vidis li kranion kuŝantan sur la tero.
- 3) Aparte de la korpo rulfalis la kranio.  
Da karno, haŭto, haroj jam restis plu neniom.

- 4) De la makzelaj arkoj la dentoj jam disiĝis,  
kun polvo de la strato la cerbo plenmiksiĝis.
- 5) Por la vespero hejmo kaj de formikoj nesto,  
la blankon de la neĝo alprenis tiu ostoj.
- 6) Plenis la orbitojn el nigra tero buloj,  
tra la oreloj pasis formikoj kaj rampuloj.
- 7) Al la krani' Jesuo rigardon turnis pian  
kaj miregante diris: „Min helpu, Dio mia!
- 8) Vi kreis homon pura kaj lin vi faris bele,  
la kompatindan poste vi mem faligis teren.
- 9) Ho Dio, pro la forto de via vivesenco,  
pro viaj kremiraĵoj kaj gloro kaj potenco,
- 10) pro nomo pura via, ho Esto memsufiĉa,  
klarigu tiun fakton por mi misteroriĉan.
- 11) De la malfeliĉulo mi konu viveventojn,  
la tutan historion ek de antecedentoj.”
- 12) Alvenis Gabrielo de la plej supra ĉielo,  
„Ho vi, Jesu' – li diris – indiku vian celon!”
- 13) „Mi volas –li respondis – ke tiu putra kapo  
komplete kaj detale rakontu sian faton.”
- 14) Li diris: „Nu demandu kaj petu pri ekspliko.  
Rakontos ĝi plej klare eventojn de l'antikvo.”
- 15) Jesuo do sin turnis, rigardis la kranion  
dirante: „Pro la vero de l'absoluta Dio,
- 16) de via pasinteco rakontu la realon.  
Ĉu jam vi estis hida aŭ vin favoris belo?
- 17) Ĉu estas via hejmo ĉielo aŭ infero?  
Ĉu emis vi donaci aŭ regis vin avaro?

- 18) Ĉu estis vi senhelpa aŭ male potenculo?  
Ĉu vivis vi reĝece aŭ kiel malriĉulo?"
- 19) Jesuon tuj informis la kapo per rakonto  
dirante: „Mi ja vivis en tre antikva tempo.
- 20) Reginto de Sirujo, Egipta suvereno,  
atingis mia famo de l' mondo la ekstremon.
- 21) Atente min obeis sep partoj de la tero  
kaj la palacon mian prilumis Jupitero. (Korano 65,13)
- 22) 40.000 min servis kaj Turkoj en sateno,  
kaj Ĉinoj elegantaj kun perloj ĉe l' orelo,
- 23) 40.000 renomaj kaj kleraj Romianoj,  
40.000 lakeoj, venintaj el Sudano.
- 24) 40.000 lunbelajn mi tenis konkubinojn,  
kun riĉaj ornamaĵoj, kun kronoj, diademoj.
- 25) 40.000 kamelojn mi havis por transporto,  
40.000 dungitoj deĵoris en mia korto.
- 26) 40.000 bravulojn, aŭdacajn kavalirojn,  
elektis mi tra l' mondo por miaj militiroj.
- 27) De mia soldataro tro granda la konsisto,  
pro ĝia nenombreblo neniu faris liston.
- 28) Tagnokte ĉiuflanke gvardio ŝirme staris.  
Por gloro de neniu tiom laŭte lip' sonoris.
- 29) En kuirejo ĉiam ardadis la forneloj,  
da kuiristoj tie laboris plena milo.
- 30) Por ĉiu povra ulo kaj vagabond' mizera  
pretiĝis varma supo por la manĝad' vespera.
- 31) Dum ĉaso mi kurigis 400-on da levreloj,  
1000 ĉaroj kun mi estis kaj falkoj kaj spanieloj.

- 32) Kun tia pomp' mi reĝis sur vasta mia ŝtato  
Kaj nun vi scias kiel ekestis mia ŝtato.
- 33) Sultan' Ĝomgom' nomata mi estis granda reĝo.  
Mi paŝtis mian mondon. Ĝi estis mia grego."
- 34) Scieme diris Kristo: „Parolu pri la morto!  
Pri via mortohoro ne ĉesu la raporto!”
- 35) Li diris: „Jun tagon post ĉaso al gazelo  
mi direktiĝis hejmen, al reĝa la kastelo.
- 36) Majestan sunombreton mi portis sur la kapo;  
el lano kaj sateno la rajda ekipaĵo.
- 37) Tuj kiam mi eniris en mian tronsalonon  
de l' verto ĝispiede trafulis min ekstremo
- 38) kaj trafis mian korpon abrupta senskolapso,  
animon mian vundis da flamoj brula fasko.
- 39) Flavigis miajn vangojn subite la paleco,  
la mano de l' teruro forpelis la konscion.
- 40) Saĝuloj, kuracistoj el ĉiuj kontinentoj  
rapide prezentiĝis kun sia kompetento.
- 41) La risko estis granda, malbona mia farto,  
kaj, malgraŭ granda zorgo, fiaskis kuracarto.
- 42) Kaŝita voĉ' eksonis el alta la ĉielo:  
«Por la verdikto Dia ne estas plu rimedo.
- 43) Prigluti oni devas de l' morto la pokalon.  
Nek fuĝo nek kuraco kongruas kun fatalo.»
- 44) Dolore pasis ankaŭ la sepa kuŝotago  
kaj jen en la ĉielo figuro sen komparo.
- 45) Figuro ne malbela, sed havis ĝi kvar manojn, (Kor. 32,12; 66,7)  
kaj supre kaj malsupre ĝi havis kvar vizaĝojn.

- 46) Ungegoj estis samaj laŭ krifoj de gepardo,  
angoron pezan ĵetis ĝi tuj en mian korpon.
- 47) La skuo de l' timego mutigis parolemon,  
deŝiris brakojn, trunkon kaj eĉ animfadenon;
- 48) ĝin tiris de piedoj ĝis mia umbiliko.  
Por tio, Di-profeto, ne taŭgas la ekspliko!
- 49) Se tiutempe havus ankoraŭ mi la voĉon,  
per krioj mi disŝirus ĉielan eĉ la volbon.
- 50) Mil estis la suferoj, torturoj kaj afliktoj.  
Turmente de la korpo disiĝis la spirito.”
- 51) „Ĝomĝom’, ho ve! – ekkriis la filo de Maria –  
rakontu kiel vi fartis en via tombo tiam,
- 52) kaj kion vi ekvidis en la eterna mondo!  
Indiku la suferojn ligitajn kun la tombo!”
- 53) „La pezan ĉerkon portis – respondis la kranio –  
kun pompo kaj honoro solena procesio.
- 54) Min priplorante sekvis sennombra homamaso  
ĝis restadejo fina de la mortonta raso.
- 55) Entere oni fosis profunde larĝan kavon.  
Sur mia tomb’ ekstaris impona konstruaĵo.
- 56) Jen du anĝeloj rektaj, du fostoj en tereno, (Kor. 50,18)  
en man’ tenadis madzon, severa la mieno.
- 57) «Ĉu vi adoris Dion? Al kiu via fido?  
Rakontu, ĉu obeis vi leĝon de profeto?»
- 58) «Mi ne ekkonis Dion nek havis religion,  
el leĝo de profeto observis mi nenion.»
- 59) La fajra madzo tiam frapegis mian kapon,  
ostaro mia tuta rompiĝis en frakaso.

- 60) «Ĉu trafis vin blindeco, kreaĵ' de l' Di' potenca?  
Ĉu la verkar' de Dio ne estas evidenta?
- 61) Li senkolone levis kaj fiksis la ĉielon,  
en ĝi aparte lokis kaj sunon kaj la stelojn.»
- 62) Denove mian kapon frapegis fajra madzo,  
la korpo tiam falis en la inferhaladzon.
- 63) Kaj jen al mi aperis la sep inferetaĝoj,  
revidis mi la agojn faritajn tra la aĝoj. (Kor. 65,13)
- 64) 100.000 mordadis bestoj: serpentoj kaj skorpioj,  
sammultaj min ŝiradis leonoj en rabio.
- 65) Interne min turmentis tre akra fajropiko.  
Por tio, Di-profeto, ne taŭgas la ekspliko!
- 66) Memoris mi la guston de l' akvo sur la tero.  
Angoro min premegis en tiu nigra infero.
- 67) Fitrinko tie fluis kaj el Zakum' fimanĝo (Kor. 14,17-18; 37,68; 38,58)  
Kaj dume min batadis bastono, vip' kaj skurĝo." (Kor. 37,63-67; 8,13)
- 68) Aŭdinte tion svenis la filo de Maria.  
Revekiĝinte diris: „Kompatu, Dio mia!
- 69) Ne brulu vi kredanton per kolereca ardo!  
Kunkudru male tendon por li per kora varmo!”
- 70) Dirinte tion Kristo deprenis la turbanon,  
rekriis: „Ho Kreinto de homoj kaj de ĝinoj! (Kor. 27,18)
- 71) Vi kreis homon pura kaj lin vi faris bele.  
La kompatindan poste vi mem faligis teren”.
- 72) Levinte sian manon aldonis li: „Ho Dio!”  
Kaj Li redonis vivon al putra la kranio.
- 73) Decide agis Dio, la Potencul' kreanta:  
el la krani' estiĝis kompleta hom' vivanta.



- 74) Ĝomĝom' fariĝis tiam modelo de piulo,  
konvertiĝinte sekvis la kredon de Jesuo.
- 75) Ne estis tamen glata la voj' al la konverto,  
sed poste lin distingis la fido kaj la virto.
- 76) Por plene pentofari konstante li fastadis,  
post 40-taga fasto malmulton li manĝadis.
- 77) Per versoj mi ĵus verkis rakonton pri Ĝomĝomo  
Por gardi la memoron de tre antikva homo.
- 78) De l' Kerbela-martiroj li estis praparenco, (Aŝurao:10an de oktobro 680)  
amiko de la rondo intima de l' Profeto.
- 79) Se koron vi bezonas je saĝo riĉigitan,  
tuj legu «Misfortunon», ĵus de Atar' verkitan.
- 80) Atar', dum vi disertas pri altaj vivkonceptoj,  
perlaron vi likigas de fajnaj vortelektaj.

## Bibliografio

*Apophthegmata Patrum. De abbate Arsenio*, in J.P. Migne (ed.), *Patrologia Graeca*, t. 65, Paris 1864 (Turnhout 1979), n. 29 (90), col. 97 - n. 44, col 108.

M. Asín Palacios, "Logia et agrapha Domini Jesu apud moslemicos scriptores, asceticos praesertim, usitata", *Patrologia Orientalis*, T. XIII, Fasc. 3, n<sup>o</sup>. 64, Paris 1917 (ristampa: Turnhout 1974), 331-431.

J.P. Asmussen, *Studies in Judeo-Persian Literature*, Leiden 1973: E.J. Brill (*Studier i jødisk-persisk litteratur*, København 1970).

W. Bacher, "Zwei alte Abothkommentare", *Monatsschrift für Geschichte und Wissenschaft des Judentums. Breslau*, N.F. 13 (1905), 657 sgg.

A. Bausani, "Note sulla struttura della *hikayat* classica malese", *Annali dell'Istituto Universitario Orientale di Napoli*, n.s. 12 (1962), 153-192.

M. Bernardini, "Peregrinazioni letterarie turco-iraniche della leggenda del Sultano Jomjome", in Antonio Pioletti (a cura di), *Il viaggio dei testi* (Atti del III Colloquio Internazionale "Medioevo romanzo e orientale", Venezia 10-13.10.1996), Catanzaro 1999: Rubettino ed., 97-134.

Clara Brakel, *The Prophet Isa and the skull*. : a Javanese version (in corso di stampa).

M. Cunbur, "Cimcime Sultan destani", *Türk Folkloru Araştırmaları Yıllığı*, 1976, 40-54.

P. Cuneo, "Le mura di Derbent. Note sulla topografia e la morfologia urbana di una città-stato del *limes* islamico nell'area caucasica", in B.M. Alfieri - U. Scerrato (a cura di), *Studi in onore di Ugo Monneret de Villard (1881-1954)*, II, *Il Mondo Islamico*, Roma 1987, 57-75 (*Rivista degli Studi Orientali*, 59, 1-4, 1985).

*E.I.*<sup>1</sup> = *Enzyclopaedie des Islâm*, 4 voll. Leiden-Leipzig 1913-1934.

*E.I.*<sup>2</sup> = *Encyclopédie de l'Islam, nouvelle édition*, Leyde-Paris 1960-

....

M. Erbetta, *Gli Apocrifi del Nuovo Testamento. Vol. III. Lettere e Apocalissi*, Torino 1969.

Farîd ad-Dîn 'Attâr, *Il Poema Celeste*, a cura di Maria Teresa Granata, Milano 1990: Biblioteca Universale Rizzoli.

D. Givišvili, - D. Lazarevi, *Ambavi žumžum xelmçipisa* (legenda) da sxva leksebi, Tbilisi 1892.

G. Graf, *Geschichte der christlichen arabischen Literatur*, 1. B.: *Die Übersetzungen*, Città del Vaticano 1944.

I.H. Hall, "The Story of Arsanis", *Hebraica* (New Haven), 6, 2 (1890), 81-88.

J. Knappert, *Islamic Legends. Histories of the Heroes, Saints and Prophets of Islam*, I, Leiden 1985.

G. Levi Della Vida, "Gesù e il teschio", *Bilychnis, Rivista mensile di studi religiosi*, 22, 2-3 (1923), 196-201 [rist. in: G.L.d.V., *Aneddoti e svaghi arabi e non arabi*, Milano-Napoli, Ricciardi, 1959, 162-169].

G. Levi Della Vida, *Elenco dei Manoscritti Arabi Islamici della Biblioteca Vaticana, Vaticani, Barberiniani, Borgiani, Rossiani*, Città del Vaticano, Biblioteca Apostolica Vaticana, 1935.

L. Massignon, *Parole donnée*, Paris 1967: ed. Seuil.

M.Y. Najm (a cura di), *Das biographische Lexicon des Salahaddin Halil ibn Aibak as-Safadi*, Teil 8, Wiesbaden 1982 (in arabo).

F.A. Pennacchietti, "La versione neoaramaica di un poema religioso caldeo in lingua curda", in B.M. Scarcia Amoretti - L. Rostagno (a cura di), *Yâd-Nâma in memoria di Alessandro Bausani*, Roma 1991: Bardi ed., II vol., 169-183.

F.A. Pennacchietti, "Il parallelo islamico di un singolare episodio della passione di San Giorgio", *Bollettino della Società per gli Studi Storici, Archeologici e Artistici della Provincia di Cuneo*, 107, 2° sem. (1992), 101-110.

F.A. Pennacchietti, "La leggenda islamica del teschio redivivo in una versione neoaramaica", in G. Goldenberg - Sh. Raz (eds.), *Semitic and Cushitic Studies*, Wiesbaden 1994: O. Harrassowitz, 103-132.

F.A. Pennacchietti, "Gesù e Bâlwan bin Hafis bin Daylam, il sultano risuscitato", in P. Branca e V. Brugatelli (a cura di), *Studi Arabi e Islamici in Memoria di Matilde Gagliardi*, Milano 1995, 145-171, Istituto Italiano per il Medio e l'Estremo Oriente, Sezione Lombarda.

F.A. Pennacchietti, "Il racconto di Giomgiomé" di Faridoddin Attâr e le sue fonti cristiane", *Orientalia Christiana Periodica*, 62/1 (1996), 89-112, + 7 tavole.

F.A. Pennacchietti, *Susanna nel deserto. Riflessi di un racconto biblico nella cultura arabo-islamica*, Torino 1998: Silvio Zamorani Edit.

W. Pertsch, *Die arabischen Handschriften der herz. Bibliothek zu Gotha*, 4 voll., Gotha 1878-1892.

H. Ritter, *Das Meer der Seele. Mensch, Welt und Gott in den Geschichten des Farîduddîn 'Attâr*, Leiden 1955.

C. Saccone (a cura di), *Il Libro della Scala di Maometto* (Traduzione di Roberto Rossi Testa), Milano 1991: SE Studio Editoriale.

A. Socin, *Kurdische Sammlungen. Zweite Abteilung: Erzählungen und Lieder im Dialekte von Bohtan gesammelt, herausgegeben und übersetzt, a. die Texte, b. Übersetzung*, St.-Petersbourg 1890.

R. Tottoli, *I profeti biblici nella tradizione islamica*, Brescia 1999: Paideia Ed.

B.L. Zekiyân, "La rupture entre les églises géorgienne et arménienne au début du VII<sup>e</sup> siècle. Essai d'une vue d'ensemble de l'arrière-plan historique", *Revue des Études Arméniennes*, n.s. 16 (1982), 155-174.

V. Žukovskij, "Legenda ob Iisuse i čerepe v persidskom stichotvornom skaze Attara", *Zapiski Vostočnogo Otdelenija Imperatorskogo Russkogo Archeologičeskogo Obščestva*, 7 (1893), 63-72.